# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 37-a APRILO | MAJO | JUNIO 2013 N-ro 150

Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*
Ĉap. XIX, §7.

Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.
ZAMENHOF. *La Espero*.

## LA EVANGELIO KAJ LA ESTONTO

Ankoraŭ ekzistas rasoj kaj popoloj, kiuj ne konas Jesuon, la Kriston. Tamen, ili ne ignoras la leĝon de amo el lia doktrino, ĉar ĉiuj homoj, eĉ en la plej foraj regionoj de la mondo, ricevis la disradiadon de lia kompatema Spirito, per la inspiritaj vortoj de liaj mesaĝistoj.

La Evangelio de la Dia Majstro ankoraŭ frontos, kelkan tempon, la rezistadon de la mallumo. La malbonintenco, malklereco, simonio kaj superregado de la forto konspiros kontraŭ li, sed venos tempo en kiu lia supereco estos de ĉiuj rekonata. Antaŭ kruelaj turmentoj kaj kolektivaj elprovoj, la Homaro, plenplena je espero, sin turnos al lia eterna lumo. Tiam, denove aŭdiĝos la benataj vortoj de la Prediko sur la Monto kaj, tra ebenoj, montoj kaj valoj, la homo konos la vojon, la veron kaj la vivon.

Emmanuel. El la libro "Emmanuel", ĉap. 2, § 6. Skribita mediume de Francisco Cândido Xavier. Portugallingva eldono de Brazila Spiritisma Federacio.

## TREJNADO POR INSTRUISTOJ

Laŭ sciigoj de samideano PAULO CARVALHO, la 28-an de Aprilo 2013, ESPERANTA ASOCIO DE RIO-DE-ĴANEJRO kaj ESPERANTA KUNFRATIĜO DE OKCIDENTA REGIONO, laborante kune, organizis la 15-AN TREJNADON POR ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ, en kiu 28 gesamideanoj partoprenis. Laŭ la organizantoj, la Trejnado estis fruktodona kaj ili jam planas la proksiman.






## AMIKOJ DE LORENZ

Jen du gravaj brazilaj geamikoj de nia Eldonejo: **RICHARD SIMONETTI** kaj **SUELY ALVES LOPES**. Nome de nia Estraro, ni ilin dankas pro la sincera amikeco!



# MESAĜO DE ESPERO

Pesimistoj, malvenkemaj aŭ negativistoj tre malmulte aŭ nenion faras por plibonigi la mondon, sed optimistoj kaj idealistoj laboras, konstante, por fari ĝin pli bona kaj pli plena je spirita kaj materia progreso.

La paco kaj la solidareco inter la homoj de ĉiuj nacioj estas eblaj. Spiritistoj kaj esperantistoj, heroldoj de Novaj Tempoj, kulturas la esperon, ke ilia persista laboro helpu la konstruadon de pli frata kaj interkomprena mondo, inter la gentoj de ĉiuj nacioj, religioj, filozofioj, etnoj, lingvoj kaj kulturoj.

Ni havas la kristanan esperon, ke la homoj bonfaremaj kaj altruismaj konservu la fidon je la kapableco de la homaro kunvivi pace kaj frate kun la loĝantoj de ĉiuj landoj, grandaj kaj malgrandaj, de tiu ĉi bela planedo en kiu ni havas la sorton naskiĝi, vivadi kaj progresadi, cele al la perfekteco.

Ke Dio, nia Patro kaj Protektanto, donu al ni sufiĉe da forto kaj saĝo, por ke ni atingu niajn celojn. Ke nia Majstro Jesuo lumigu kaj benu nian laboron en la konstruado de pli frata, ama kaj justa mondo por ĉiuj. Multe da paco al la Homaro!

ALBERTO FLORES

## NI SEMAS KAJ SEMAS...

GRUPO DE ESPERANTO PAC-HORO, kiel kutime okazas ĉiujare en OKCIDENTA REGIONO DE RIO-DE-ĴANEJRO, Brazilo, organizas sian tradician "Spiritistan Esperantistan Monaton", kiam la Grupo vizitas spiritismajn domojn diskonigante Esperanton. Ĉi-jare, la Grupo prelegis specife al la junularo en tri spiritismaj centroj. Ĉe la fino de la unua kunveno, la GRUPO PAC-HORO omaĝis la francan samideanon ALEXANDRE RAYMOND, kiu estis speciale invitita kaj partoprenis en la kunsido, donacante al li ekzempleron de *La Libro de la Spiritoj*, en Esperanto, subskribitan de ĉiuj ĉeestantoj.



LORENZ

**"KOMUNIKOJ"**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975
Jaro 37-a – n-ro 150 – Aprilo-Majo-Junio 2013

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: **+ 55-21-2221-2269** | **+ 55-21-2450-4768**
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br**




Kompostita de Rogério Mota

# NOVA LUMO

Nova lumo venis al la Tero,
Lumo sankta de la Sankta Dio!
Disfluiĝas tute la mistero
Sur la forto de l' Evangelio.

Nun la pordoj bronzaj de l' karcero,
Entenanta ombron de l' Nescio,
Falas brue... Restas nur polvero...
For mallumo! hela estas ĉio!

Vivon novan nun ricevis vorto
De l' eterna Majstro el la forto
De la flora lingvo Esperanto.

Nun popoloj ĉiuj vidos klare,
Dion Bonan dankos, kaj grandare
Kolektiĝos por la nova kanto!

ABEL GOMES. *Mediuma Poemaro* – Poemoj de pluraj aŭtoroj originale verkitaj en Esperanto, mediume skribitaj. Mediumo LUÍS DA COSTA PORTO CARREIRO NETO. Eldonita de Brazila Spiritisma Federacio.

Noto: Ĉi tiun soneton la Spirito verkis en la jaro 1947, okaze de la apero en Esperanto de la libro *La Evangelio laŭ Spiritismo*.




NOVA LANĈO DE LORENZ! – Eldonejo Lorenz lanĉas en la portugala lingvo la libron *No tempo do Império* (*En la Tempo de la Imperio*). La verko pritraktas la reĝadon de Petro la 2-a, brazila imperiestro de la 19-a jarcento. PAULO ROBERTO VIOLA rakontas, per spiritisma-kristana inspiro, interesajn faktojn kaj nekonatajn detalojn pri tiu grava historia epoko.

# Esperantista Foiro

En entuziasma kaj kunfratiĝa etoso, realiĝis la unua esperantista foiro de "Niterói', (11 kilometrojn for de la urbo Rio-de-Ĵanejro) de la 20-a ĝis la 23-a de Aprilo, apud la pramstacio. Multaj homoj vizitantaj la foiron surpriziĝis kaj interesiĝis pro la granda nombro da libroj en Esperanto kaj pro la ĉeesto de pluraj junuloj, kiuj jam konas kaj studas la lingvon per Interreto, eĉ ne partoprenantaj la movadon. Multaj distingindaj esperantistoj vizitis kaj partoprenis la eventon, kaj oni jam planas novan foiron, por la proksima jaro, samloke.



# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Respondoj al la amikoj. “La Esperantisto”, n-ro 5, p. 32, 1890.

Al la abonantoj.

La mono por la gazeto “La Esperantisto” devas esti sendata ne al mi, sed rekte al la redaktoro (Adreso: Herrn Chr. Schmidt, Spittlerthorgraben 33, Nurnberg). Anstataŭ mono germana oni povas sendi ankaŭ monon de ĉia alia lando kaj ankaŭ signojn de poŝto. Se iu ne ricevas la gazeton akurate, li devas sin turni ankaŭ rekte al la redaktoro.

Al Majnov, 1889, Ĥerson.

Estimata amiko!

En kia numero de la gazeto estos presita via letero, mi ne povas al vi diri, ĉar ĝi ne dependas de mi: la dividado de la materialo laŭ numeroj jam estas afero de s-ro Schmidt. Mi pensas, ke via letero estos kredeble en la n-ro 6, aŭ eble pli frue, se estos loko. Bonan rimedon kontraŭ via malsano mi ne povas al vi montri, ĉar ĉio dependas de la individua karaktero de la malsano kaj de la antaŭa irado de la kuracado; tial mi konsilas al vi la plej bone, turni vin al ia specialisto, tiom pli ke mi min okupas escepte de malsanoj de okuloj kaj ne estas kompetenta en via malsano.

Al Majnov, 1889, Ĥerson.

Estimata amiko!

La “Esperantisto” estas permesita. Nun mi intencas jam loĝi konstante en Ĥerson, kaj ĉiujn leterojn vi povas adresi tien ĉi; sed ankaŭ la leterojn kiuj estas adresitaj en Varsovion, mi ricevas akurate tie ĉi (kvankam iom pli malfrue), ĉar oni transsendas ilin al mi. La 10 ekzemplojn de la lernolibro mi jam sendis al vi, mi ankaŭ skribis al vi pri la “Kolekto” kaj “Adresaro”. Mia librotenejo estos nun en Ĥerson; sed ankaŭ en Varsovio mi lasis certan nombron da verkoj, kaj tiel ankaŭ el Varsovio oni povas elskribadi.

Al Borovko, 1896. “Lingvo Internacia”, n-ro 6-7, paĝoj 115-119.

(...) Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi “doloro pro la mondo” ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la “grandaĝaj” posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.




**NI ATENDAS VIAN PARTOPRENON!** – Se vi volas disvastigi vian esperantistan eventon aŭ se vi havas tekston interesantan al la spiritista-esperantista movado, nia bulteno estas malfermita al vi! Se vi respondecas pri ia spiritisma agado, ni volonte publikigos informojn pri ĝi en “Komunikoj”. En la tuta mondo estas esperantistoj kiuj tre ŝatos koni la laborojn de via spiritisma domo.

**NÓS AGUARDAMOS SUA PARTICIPAÇÃO!** – Se você quer divulgar seu evento esperantista ou se tem um texto que interesse ao movimento espírita-esperantista, nosso boletim está aberto para você! Se você é responsável por alguma tarefa espírita, com prazer publicaremos informações sobre ela em “Komunikoj”. No mundo inteiro há esperantistas que gostarão muito de conhecer as atividades de sua casa espírita.

# VIVO FELIĈA

Zorgu vin, por ke la pesimismo kaj
la ribelo ne gastu en viaj sentoj,
sensentigante aŭ ekscitante viajn nervojn.

Rekonsideru sintenojn kaj malagrablajn
okazaĵojn, provizante vin per bona
intenco kaj marŝante trankvile.

Via spirita stato multe kontribuas al la
rezulto de viaj aspiroj kaj agoj.

Kiam vi komencas taskon malbonhumore
aŭ ribeleme, vi jam perdas la plibonan
parton de la plenumo.

En ĉiujn viajn entreprenojn enmetu la
sunon de la espero kun la varmo de la
optimismo, kaj la sukceso
estos neevitebla.

Joanna de Ângelis. El la libro "Vivo Feliĉa", ĉap. 93. Mediumo Divaldo Pereira Franco. El la portugala lingvo tradukis Osvaldo Pires de Holanda. Eldono de Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz.

**ĈU VI ANKORAŬ NE RE-ALIĜIS POR 2013?!** – Se vi ankoraŭ ne re-aliĝis, ne forgesu, ke via jara kontribuo treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj. Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj kun plezuro ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel ano, ricevos en la komforto de via hejmo. Ne forgesu nin sciigi kiam vi deponos la pagon de via jarkotizo. Dio benu vin!

**VOCÊ AINDA NÃO RENOVOU SUA ANUIDADE NA LORENZ?** – Não se esqueça de que sua contribuição ajuda-nos a editar obras espíritas em Esperanto e enviá-las gratuitamente a nossos companheiros no exterior. Caso você nunca tenha sido sócio da Lorenz, entre em contato conosco e com prazer lhe informaremos sobre nosso trabalho e sobre tudo o que você, como membro, receberá no conforto de sua casa. Não se esqueça de nos informar quando enviar-nos o pagamento da sua anuidade. Que Deus lhe abençoe!

## NOTOJ PRI LA ESPERANTISTA MOVADO EN LA REGIONO "CARIRI"



Komenciĝis la unua Esperanto-kurso en tiu regiono, kiu situas nordoriente en Brazilo, en la ŝtato "Ceará". La lecionoj okazas dimanĉe je la 3-a posttagmeze, en Spiritisma Centro Andreo Ludoviko. La instruisto estas samideano Maurice Farley, kiu ankaŭ prelegis en Spiritisma Domo La Bona Samariano, la 17-an de Aprilo. En ĉi tiu okazo, li parolis pri la historio de Esperanto, pri ĝia kreinto D-ro Zamenhof kaj pri la gramatika simpleco kaj interna ideo de la lingvo. Aliflanke, la preleganto atentigis pri la sendependeco de Esperanto rilate al la Spiritisma Doktrino, ĝia neŭtraleco kaj aparta movado. Li rimarkigis la multajn uzadojn de Esperanto en la plej diversaj homaj grupoj, sendepende de Kredoj kaj sociaj pozicioj. Jen la adresoj de tiuj spiritismaj institucioj:

Centro Espírita André Luiz – (Spiritisma Centro Andreo Ludoviko)
Rua Delmiro Gouveia, 67 – Sossego – 63107-072 Crato-CE – Brasil (Brazilo)
Lar Espírita O Bom Samaritano – (Spiritisma Domo La Bona Samariano)
Rua dos Cariris, 92 – Seminário – 63113-622 Crato-CE – Brasil (Brazilo)

# ĈU EKZISTAS SPIRITOJ?

La dubo pri la ekzisto de la Spiritoj havas kiel unuan kaŭzon la nekonadon de ilia naturo. Oni ordinare ilin imagas al si kiel estulojn apartajn inter la kreitoj, estulojn, kies neceso ne estas ja pruvita.

Nu, tiuj animoj, kiuj priloĝas la Spacon, estas ĝuste tio, kion oni nomas Spiritoj; la Spiritoj estas do nenio alia, ol la homaj animoj, liberiĝintaj el sia korpa envolvaĵo. Se la Spiritoj estus kreitaĵoj apartaj, ilia ekzisto estus pli hipoteza, sed konsentante, ke ekzistas animoj, oni do devas konsenti ankaŭ, ke ekzistas Spiritoj, kiuj estas nenio alia ol animoj; kaj se oni konsentas, ke la animoj troviĝas ĉie, oni do devas same konsenti, ke la Spiritoj sin trovas ĉie.

Nun restas ekscii, ĉu la Spiritoj povas komunikiĝi kun la homoj, t.e. ĉu ili povas interŝanĝi pensojn kun ĉi tiuj. Kial do ne? Kio estas la homo, se ne Spirito ligita al korpo? Kial Spirito libera ne povus havi rilatojn kun Spirito mallibera, tiel same, kiel homo libera kun homo katenita? Se iu akceptas la transvivon de la animo, ĉu do estas racie ne konsenti la transekzistadon de la korligiĝoj? Ĉar la animoj sin trovas ĉie, ĉu tial ne estas nature ekpensi, ke la animo de iu homo, kiu amis nin dum sia vivo, venus al ni, ke ĝi dezirus paroli al ni, kaj ke, por tio, ĝi uzus la disponeblajn rimedojn? Ĉu dum sia vivo ĝi ne agis sur la materion de sia korpo? Ĉu ne ĝi direktis ties movojn? Kial do post la morto de sia karna envolvaĵo, en konsento kun alia Spirito ligita al korpo, ĝi momente ne prenus al si tiun korpon vivantan, por manifesti sian penson, simile kiel mutulo povas uzi la servemon de iu parolkapabla, por sin komprenigi?

Allan Kardec. *La Libro de la Mediumoj – Gvidlibro de la Mediumoj kaj Elvokantoj*, unua parto, unua ĉapitro, §§ 1-5. El la franca lingvo esperantigis L. C. Porto Carreiro Neto kaj Ismael Gomes Braga. Eldono de Brazila Spiritisma Federacio.



**KURSO DE ESPERANTO ĈE LA FEDERACIA UNIVERSITATO DE SANKTA-KATARINO**

La 11-an de Marto 2013, komenciĝis nova kurso de Esperanto en "NETI" – Centro de Studoj por Maljunuloj (Tria Aĝo) – ĉe Federacia Universitato de Sankta-Katarino (UFSC). Ĉi-jare matrikuliĝis dek tri gelernantoj. Ekde 1983, UFSC apogas studojn kaj esplorojn por kreskigi la memestimon de triaĝuloj kiel ŝanĝiĝantaj homoj kaj agantoj, kiuj kapablas transformi la socion. La kursanoj ne ekzameniĝas, sed por ricevi atestilon, ili devas ĉeesti 75% el la lecionoj. Tiu kurso estas subtenata de "NETI" ekde 2004. En la unua jaro, aliĝis dudek naŭ interesiĝintoj, kies aĝoj variis de 59 ĝis 84 jaroj. Plej multaj el ili deklaris, ke ili deziros nur ekscii iom pri Esperanto. Aliaj, delonge volis lerni la lingvon, ĉar ili aŭdis pri ĝi kiam ili estis junaj. Post du semestroj, ili kapablis legi kaj skribi kun helpo de vortaro. Oni povas tiel konstati, ke homoj ankaŭ en la tria aĝo povas lerni Esperanton. En la foto, la instruisto Antônio Félix aperas en bela "ĝardeno" de simpatiaj lernantinoj.

**FÉ E RAZÃO**

Foi Deus que nos deu a fé,
Mas deu também a razão...
São essas as duas asas
Da nossa evolução...



**FIDO KAJ RACIO**

Dio donis al ni fidon,
Sed kune kun la racio...
Jen estas la du flugiloj
De nia evolucio...

*De Jair Salles para Danilo Vilela*